

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)



Feliĉan Novjaron! kaj...



Mia mesaĝo "Feliĉan Novjaron!" estas mia elkora deziro al vi ĉiuj. Aliflanke mi timas, ke ĝi sonus vane, ĉar ni japanoj spertis en la jaro 2011 senprecedencan katastrofon kaj ankoraŭ nun nemalmultaj homoj suferadas pro ĝiaj sekvaĵoj. En tia situacio la brila saluto sentigas min iom hontinda.

Mi baldaŭ retirigos de la posteno de la prezidanto de Jokohama Esperanto-Rondo. Mi kore dankas vin pro via varma helpo kaj kuraĝigo dum la periodo. Mi ne scias, ĉu mia klopodo iomete utilus al vi, sed mi mem gajnis multon en la sperto. Mi esperas, ke laŭeble multaj anoj volonte partoprenu en movadaj aferoj.

Mia sola bedaŭro estas, ke nia rondo ne povis sukcesi en varbado de novaj junuloj.
Aida Yayoi



NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

*Regulaj Klasoj en sabato: Mezaj Klasoj 1, 2 kaj 3 / Jokohama Salono.

*Regula Klaso en merkredo.

*Hama-Ronda Vespero kaj Interklasa Lernado

jan. 21 (sab) 16h30-19h00, ĉambro 709
De 16h30 por duonhoro, Sibayama Zyun'iti prezentos ludon.

De 17h00, s-ro Karibe Riiĉi parolos pri

alpinismo, montrante la filmon de "La Alpoj Svisaj".

feb. 18 (sab) 16h30-19h00, ĉambro 710
Temo kaj lekcioanto ankoraŭ ne estas fiksitaj.

*Ĝenerala Kunsido de Jokohama Esperanto-Rondo

jan. 28 (sab) 15h00-17h00, ĉambro 710
Ĝi estas la plej supera decid-organo de JER, okazanta 1 fojon jare. Tie la lastajara raporto kaj kaso estos revuata, la 2012-a plano kaj kaso estos aprobita, kaj la novaj estraranoj estos fiksitaj. Pro la evento, la regulaj lerno-kunsidoj ne okazos.

■ Eldonas Aida Yayoi ■ Redaktas la organa fako de JER: Miyazaki Hideko
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

ĈE JOKOHAMA INTERNACIA FORUMO 2012

en la 1-a konferenca ĉambro en la kunvenejo de "JICA Yokohama"

feb. 12 (dim) 13h00-13h50

Ni havos prelegon pri Esperanto, okaze de la prelegaro malfermita al la civitanoj en Jokohamo. S-ro Suzuki Keiĉiroo parolos japanlingve: "Diversajn internaciajn agadojn per Esperanto".



TIEL OKAZIS EN LA ZAMENHOFA FESTO



en la Kultura Halo de Urbo Ĉigasaki

dec. 10 (sab) 11h30-16h30

Al la Zamenhofa Festo kunvenis el la 4 rondoj en la Gubernio Kanagawa 51 personoj, el kiuj 30 estis de ni Jokohama Esperanto-Rondo (JER). La aliaj rondoj estas Kawasaki, Huzisawa kaj Odawara. Prezidis la feston s-ro Huse Kentaro. Antaŭ la tagmanĝa ripozo, okazis serio da mallongaj prelegoj, meze 10 minutoj, de 8 personoj, kiel sube montritaj. 4 el ili temis pri la ĵusa Komuna E-Kongreso de Japanio kaj Koreio. Libro kaj diskoj estis prezentitaj de JER, kaj ĉ. 80 000 enoj da libroj estis venditaj. Post komuna fotado ni havis liberan tempon por tagmanĝo. La posttagmeza parto estis komencita per koruso el JER-anoj kaj aliaj, kaj la ĉefa prezentaĵo estis prelego plus magio de s-ro Hukuda Tosihiro. Lia tempo estis dividita en 3 partoj. En la unua li esperantlingve pledis pri la help-agado al la atomcentrale ĝenitaj distriktoj en Hukusima, en la dua li rakontis sian



sperton agadi por Esperanto en Afganio kaj en Sirio, kune kun la talento de magio-spektaklo. En la fina parto li montris spektaklon da magioj. Fine, la verda standardo estis manigita al la membro de Odawara, kiu okazigos la venont-jaran Zamenhofan Feston.

(La listo de la prelegantoj kaj la mallongaj prelegoj)

- s-ino Kanatu Nobuko: La Komuna E-Kongreso kaj la koruso
- s-ino Koyanagi Syooko: La Komuna E-Kongreso kaj mi
- s-ino Sano Hisako: La malnova vilaĝo Hahuemaŭl (en Koreio)
- s-ino Oki Mayumi: Ni faru sveltan korpon prenante gimĉion
- s-ro Iwaya Mituru: Nur-Esperanta Kunvivado en Yatugatake
- s-ro Sibayama Zyun'iti: Deklamado de la poemoj de Miyazawa Kenzi
- s-ino Nemoto Naomi: Esperanto – espero por vivi en la senespera mondo (Vidu artikolon en tiu ĉi n-ro.)
- s-ro Suzuki Keiĉiroo: Nova statuto de Japana Esperanto-Instituto (en la japana lingvo)

LEGOKUNVENO

Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj

Ivo Lapenna

Mizro Iwaya

D-ro Prof. Ivo Lapenna estis elstara figuro en postmilita Esperanto-movado, precipe rilate al UEA. Pri ties detaloj vi povas konsulti "Utila Estas Aliĝo" de Ulrich Lins, kiun ni legis en Julio 2009 (vd N.T. Okt. 2009). Li estis fama oratoro. Sekve, restas multaj paroladoj kaj prelegoj liaj. Tiu ĉi libro estas ilia kolekto ekde 1950 ĝis 1970, antaŭ lia ekŝiĝo el UEA en 1974.

Unue mi rimarkis lian ardan kaj optimisman laŭdadon al Esperanto kaj ĝia movado. Laŭ li, Esperanto estas science perfekta. Tial ĝia movado estas nun kreskanta kaj baldaŭ atingos sukceson. Tia eldiro estus certe agrabla al ni esperantistoj, sed la fakto ne montris glatan disvolviĝon. Eble ni devos havi pli longan lukton en la mondo.

Tiu ĉi estas kolekto de paroladoj prezentitaj antaŭ granda publiko. Ĝi havas en tiu senco kelke da elementoj de agitado. Tial mi trovas fojfoje ripeton de samsignifaj vortoj, kiuj aspektas al mi pleonasmaj. Sed kiam oni aŭdas ĝin, tia esprimo donus pluan koloron al ĝi. Same troveblas enkondukaj komplimentoj ĉe

la komenco, abundaj ornamaj aŭ kvalifikaj vortoj. Certe tia estas la karaktero de parola lingvo-evoluo. Mi aldonas ke ni povas enmanigi al ni kompakto-diskojn de “Paroladoj de Ivo Lapenna”. Lia manuskripto pli taŭgas en aŭdata formo. Tial mi rekomendas la KD samtempe.

ESEO

Filmo “La Flugsonoj de Abeloj kaj la Sinturniĝo de la Terglobo”

Tanigaŭa Hiroŝi

En la 20a de julio, 2011, ĉe Nagahama-Halo en la Kvartalo Kanazaŭa, Jokohamo, mi spektis la filmon: “La flugsonoj de Abeloj kaj la Sinturniĝo de la Terglobo”(*1). La enhavo de la filmo konsistis el du partoj.

En la unua parto, prezentita estas la kontraŭ-atomcentrala agado fare de la loĝantoj de la Insulo Iŭaiĵima (*2), kontraŭ la Atomcentralo Kaminoseki (*3) de Ĉugoku-Denrjoku (la Elektropova Kompanio Ĉugoku), ĉe la Maro Setonaikai, gubernio Jamaguĉi. La kontraŭ-agado de la Iwaiĵima-anoj komenciĝis jam en 1982, kiam Ĉugoku-Denrjoku publikigis la konstruadon de atomcentralo en la Urbo Kaminoseki. Ekde tiam la loĝantoj de la Insulo Iŭaiĵima, ĉefe fiŝistoj, persiste daŭrigis agadojn kontraŭ la konstruado de la atomcentralo. La konstru-procedo fare de Ĉugoku-Denrjoku malfruiĝis pro la daŭraj kontraŭ-agadoj de la Iwaiĵima-anoj.

Kaj ĝuste en la 11a de marto, tiu katastrofa tago de la Granda Tertremo en Tohoku, Ĉugoku-Denrjoku decidis komenci polderigon de la maro por la Atomcentralo. Post la Tertremego, la guberniestro de Jamaguĉi petis la kompanion

ĉesigi la polderigon.

En la dua parto, oni prezentas la aktivecojn de la svedoj celantaj “Konstrui socion sendependan de petrolo”. La reĝisorino de la filmo, s-ino KAMANAKA Hitomi (*4), naskita en 1958 en Tojama, skribis en la flugfolio por la filmo, jene, resume.

“Celante nian subteneblan futuron, mi produktis ĉi-supran filmon kiel la trian, sekve al la jenaj du filmoj antaŭe produktitaj: (1) ‘Hibakuŝa --- Ĝis la fino de la Mondo’, kiu prezentas la daŭrajn elmetiĝojn eksterajn kaj internajn fare de radiado, kaŭzitajn de la malakigitaj uraniaj bomboj. (2) ‘Rapsodio en la Vilaĝo Rokkaŝo’.”

KAMANAKA aldone skribis: “La titolon de la filmo ‘La Flugsonoj de Abeloj...’ mi prenis el la vortoj de Einstein: ‘Kiam la homoj nenie ekaŭdas la flugsonojn de abeloj, la homaro pereos ĝis post 4 jaroj’.”

(*1) 「ミツバチの羽音と地球の回転」

(*2) 祝島

(*3) 上関

(*4) 鎌仲ひとみ

PRELEGO

Esperanto – espero por vivi en la senespera mondo

Nemoto Naomi

Mi eklernis Esperanton antaŭ du jaroj, ĉar mi volas scii pri kulturoj kaj homoj en diversaj landoj, precipe homoj kiuj ne uzas la anglan

lingvon. Mi ŝatis lerni la anglan lingvon de kiam mi estis juna, kaj mi tradukis kelkajn librojn de la angla al la japana. Sed iom post iom mi fariĝis

suspekti, ke uzado nur de la angla lingvo limigas mian intereson al vastaj, diversaj landoj. Tiam mi subite rememoris ekzistadon de internacia komuna lingvo, Esperanto, kiun mi lernis iomete kiam mi estis infano. Tial nun mi kontente kaj ĝoje lernas Esperanton en Jokohama Esperanto-Rondo dum du jaroj.

Sed ĉi-jare situacio de nia socio ege kaj terure ŝanĝiĝas kompare kun la situacio antaŭ du jaroj. Do, la signifo de Esperanto por mi ankaŭ ŝanĝiĝas. Antaŭe mi rekonis ke en Japanio ni havas tre multajn problemojn, ekzemple tiujn de granda financa defcito, depresio de ekonomio, alta grado de suicido, konfuzo de pensia sistemo kaj tiel plu. Sed senco de krizo estis ne tre forta kaj profunda ol estas nuntempe.

Post la granda tertremo en marto, mi sentis ke la mondo tute ŝanĝiĝis. Min surprizis, ke en nia socio estas plena de grandega risko kiun mi ne rimarkis ĝis tiam. Mi ofte aŭdis de kiam mi estis infano, ke forta tertremo povos okazi ĉiumomente. Do, la granda tertremo estis iom atentebla. Sed mi neniel pensis pri ebleco de la katastrofa akcidento de nuklea centralo. Mi sciis ke, katastrofo de Ĉernobilo estis tre tragika, sed mi neniel pensis ke simila akcidento okazos en Japanio.

Ŝajnas al mi, ke ni Japanoj havas du malfacilajn taskojn. Unu estas la solvo de okazinta akcidento de nuklea centralo en Hukusima (*Fukushima*). La alia estas la kontraŭrimedo por okazonta nuklea akcidento kaŭzota de alia granda tertremo. Estas dek sep nukleaj centraloj, kun pli da reaktoroj, en Japanio, kaj ili situas proksime al maro, do ili estas tre danĝeraj kiam forta tertremo kaj cunamo atakas.

Ni nun vivas en la mondo plena de malfacilaj problemoj, maltrankvileco kaj malstabileco. Nia estonteco aspektas malluma kaj senespera. Sed por mi, Esperanto fariĝas granda espero por vivi en tiu senespera mondo. Kial mi pensas tiel? Mi volas klarigi jene.

Unue, mi sentas ke la ekzistado de Esperanto mem kuraĝigas min. Post la granda tertremo, estis plena de tragikaj informoj kaj ni estis ĉirkaŭitaj de maltrankvila situacio. Sed lernado de Esperanto forte kuraĝigas min. Kiam ni frontas kontraŭ malfacilaĵo, ni ofte tendencas fermi nian koron kaj plendi nian malfeliĉon. Sed uzado de Esperanto mem instigas nin malfermi nian koron al vasta mondo kaj turnas nian rigardon de interno al ekstero. Ŝajnas al mi, ke Esperanto funkcias ne nur kiel lingvo sed ankaŭ kiel ideo kiu kuraĝigas nin. La interna ideo de Esperanto, ke ĉiuj homoj estas egalaj, kunligas nin al homoj de diversaj landoj. Per Esperanto, ni povas senti ke ni havas multajn amikojn kaj samideanojn tra la mondo.

Due, mi pensas ke Esperanto havas multajn eblecojn por estonteco. En estonta mondo ni probable ne povos kredi nacion aŭ politikiston se tiaj katastrofoj okazos. Temas pri atoma energio, estas pli ol 400 reaktoroj en la mondo nun kaj povos okazi aliaj akcidentoj de nuklea centralo ie en alia lando. Ni probable bezonos ne nur diplomatajn rilatojn inter nacioj sed ankaŭ rilatojn kaj kooperadojn inter ordinara homoj en diversaj landoj. Tiukaze ni esperantistoj povos plenumi gravan rolon por kunligi homojn. Per Esperanto ni povas fariĝi pontoj kiuj ligas alilandajn esperantistojn al japanoj kiuj ne uzas Esperanton.

Trie, Esperanto helpas nin interŝanĝi gravan informon kun popoloj de multaj landoj. Nun estas klare, ke la japana registaro kaj Elektra Kompanio Tokio fojfoje kaŝas aŭ falsas gravajn informojn. Ni mem devas pli kaj pli klopodi por akiri veran informon. Dank' al interreto ni povas trovi multe da informoj per Esperanto kaj povas ankaŭ sendi informojn pri nia situacio.

Laste, mi volas profunde danki al Zamenhof, kiu kreis Esperanton en malfacila situacio. Lia kreado estas granda donaco por ni, kiuj devas vivi en tiu ĉi senprecedenca kaj malstabila periodo.

(decembro, 2011)

